

## ESPERANTO EN LA BRAZILA SPIRITISMA MOVADO

La iniciaton veki la intereson de la spiritistoj pri Esperanto ni ŝuldas al la senkompara figuro de Leopoldo Cirne, kiam li, kiel prezidanto de la Brazila Spiritisma Federacio, publikigis gravan deklaron de francaj spiritistoj pri la lingvo, kiu tiam aĝis nur 22 jarojn.

La argumentado en tiu dokumento restas freŝe aktuala, kaj en ĝi ĉefe reliefigindas ia inspirdevena elemento, kiu poste plene konfirmiĝis, nome la fakto, ke Esperanto estis kreita en la spirita mondo por solvi tiean lingvan problemon. Kune kun la mesaĝoj *La Misio de Esperanto*, de la Spirito Emmanuel, kaj *Esperanto kiel Revelacio*, de la Spirito Francisco Valdomiro Lorenz, ambaŭ psikografie skribitaj de la mediumo Francisco Cândido Xavier, respektive en 19.01.40 kaj 19.01.59, la artikolo presita en la oficiala organo de la Brazila Spiritisma Federacio, la revuo *REFORMADOR*, en la 15-a de Februaro 1909 konsistigas la trion, kiu inspiradas la poresperantajn agadojn en la brazilaj spiritistaj rondoj.

Jen la tuta artikolo verkita de J. Camille Chaigneau, kiu, laŭ *REFORMADOR*, estis jam aperinta en 1908, en la revuo de Gabriel Delanne, kaj poste represita en *La Vie d'Outre-Tombe*, el Charleroi, sub la titolo *Esperanto kaj Spiritismo*:

*“Esperanto estas lingvo kreita de D-ro Zamenhof, kiu havas adeptojn en la tuta mondo (pli ol 80.000) kaj evidentigas sian kreskantan vivipovecon, siajn grandegajn progresojn en notindaj kongresoj, dank'al sia facileco kaj internaj kvalitoj.*

*Favoras al ĝi argumento findecida: ĝi estas parolata.*

*Ĝi minacas neniun nacian lingvon, kaj komisiono el saĝuloj ĝin elektis kiel helpan, internacian lingvon, rekomendindan por uzado en la diversaj landoj. Tial la plimulto el la universal-karakteraj movadoj ekutiligas Esperanton.*

*La plej gravaj dokumentoj venantaj de ĉiuj partoj de la mondo povas koncentriĝi en unu komuna revuo kaj, dank'al ia neŭtrala lingvo, esti alireblaj al ĉiuj, kiuj studas samklasan temaron. Pro la kvanto da faktoj, kiujn al ni, spiritistoj, ne eblas koni manke de traduko, kaj pro la malfruo kaŭzata de traduko mem al nia dokumentado, ŝajnas, ke Spiritismo devas havi plenan intereson fondi centran revuon, kie kolektiĝus la plej gravaj faktoj dank'al lingvo komuna al ĉiuj landoj.*

*Necesas do, ke Spiritismo profitu tiujn avantaĝojn. La nura fakto utiligi Esperanton starigas fratan ligilon inter ĉiuj esperantistoj kaj faciligas la skriban aŭ*

*parolan interkomunikiĝon de ĉiuj doktrinoj. Ĝi estas do absolute utila al ĉiu sincera ideo.*

*La aliĝo de kolektivo al Esperanto havigas prestiĝan forton al tiu lingvo, sed tiu kolektivo kompanse ĝuas la komunikan potencon de Esperanto.*

*Se ni volus malkovri la genezon de tiu lingvo, ni ja konstatus, ke ĝi montriĝas kiel instrumento de kunlaboro kun la Nevidebla Mondo.*

*Tiu senpersoneco konsistigas ĝian superecon; tiu kunhelpo estigas ĝian altirforton.*

*Ĉiuj, kiuj laboras sur la kampo de la progreso, kunagos favore al tiu verko tiel bela kaj tiel fekunde efika por la homa interproksimiĝo. Esperanto entenas la flamon de la frateco; ĝi nepre vivos.*

*Koncernas la spiritistojn profiti el ĝiaj vivodonaj aspiroj kaj al ili vigligi la vivipovecon.”*

\*\*\*

La kreskado de la tutmonda spiritista familio, trudante la bezonon de la rilatoj inter diverslandaj movadoj, havigis al ĉi tiuj pli klaran konscion pri la lingva problemo kun ties tuta sekvantaro el materiaj kaj spiritaj malbonaĵoj. Kaj la instrumento por facile forigi tiun obstaklon de longe estas disponebla.

Kiel ja nature, la brazilajn spiritistojn koncernis la tasko, post sia aliĝo al la nobla verko de Zamenhof, ĝin kulturi, disvastigi kaj utiligi en siaj rondoj, por ke en la oportuna momento la alilandaj kunfratoj povu ĝin pli facile adopti.

Ni do nun plenumu tiun novan eron de la programo koncernanta Esperanton en la rondoj de Spiritismo. Ni ĝin etendu al niaj alikontinentaj fratoj, ni faru el ĝi komunan lingvon por niaj internaciaj rilatoj, kaj tiel ni nepre spertos progreso-etapon indan je universalisma idealo, kia la Kristana Spiritismo.